S-(in)-o(j)
.....
.....
.....
.....
.....
(nomo kaj antaŭnomo, adreso,
retpoŝta adreso, telefonnumero)

partoprenos kun ..... personoj(j)
(=totala nombro de personoj)
al la Tago de la Flandraj Ardenoj,
dimanĉon la 22an de aprilo 2017.

Mi venos per ..... (transportilo)
Mi restos la tutan tagon /
nur antaŭtagmeze/
nur posttagmeze (indiku vian elekton)
Kaj ĝiros ..... x 5 €
al la konto BE15-5230-8080-6230
BIC TRIONL2U
de Piet Glorieux
(eksterlandanoj rajtas pagi surloke)

Dato:
Subskribo:
Sendu rete aŭ poŝte al:
Piet Glorieux
Pastoor Blanckestraat 8 pk. 0201
8610 KORTEMARK
T. (00 32) (0) 472 257 918
retadreso: piet.glorieux@gmail.com

La *Flandraj Ardenoj* estas la nomo, kiun oni donis al belega monteta regiono en la okcidenta parto de Flandrio, 30 km sude de Gent kaj 30 km oriente de Kortrijk. Venu kaj ĝuu!

NATURO, KULTURO kaj... ESPERANTO

dimanĉo
la 22a de aprilo 2018

organizado:
LA KONKORDO – KORTRIJK

Nature…

Ĉi-jare ni vizitos antaŭtagmeze je 9h la Bos t'Ename en Ename-Oudenaarde.
Rendevuloko: enirejo de la PAM-muzeo, Lijnwaadmarkt 20.

Tagmeze ni manĝos nian piknikon en trinkejo Stad Oudenaarde, Abdijstraat 78 en Ename.

… kaj kulture

Postagmeze ni vizitos la arĥeologian prifosejon de Ename. Temas pri fundamentoj de la iama benediktana abatejo kiu dominis la vivon en la regiono de 1063 ĝis 1795.
Ni komencos la promenadon je 13h45 antaŭ la trinkejo Stad Oudenaarde.

Praktike

La tago konsistas el gvidata promenado matene kaj posttagmeze kulturhistoria promenado.
Eblas partopreni nur unu el ambaŭ aktivecoj. Vidu la aliĝilon.

Antautagmeze loka ĉiĉerono gvidos nin nederlandlingve. Ni kompreneble provizos esperantlingvan tradukadon se ĉeestos alilingvanoj.

Por la antaŭtagmeza naturpromenado vi plej bone provizos vin per botoj! Sed ne timu: estas nek ‘fakekskurso’ nek ‘sportkonkurso’. Konsideru tamen ke plejofte la promenado ne taŭgas por puŝĉaretoj.

Alportu mem vian piknikon.

La rendevulokoj estas plej facile atingeblaj per aŭto. Se tamen vi deziras veni trajne, prenu sufiĉe fruan trajnon al Oudenaarde kaj nepre avertu nin!
Por la tuta tago ni petas kotizon de 5 €. Ebla profito iros al la ‘Naturfonduso Flandraj Ardenoj’.
Post aliĝo vi ricevos ĉiujn necesajn detalojn (inkl. vojindikojn).
Ne prokrastu vian aliĝon!

Tri bonaj kialoj por partopreni

Unue. Malkovru naturon kaj kulturon en bela flandra regiono dum la plej bela sezono.

Due. Apogu la klopodojn de la lokaj naturasocioj por konservi la ekologian kaj estetikan valoron de la regiono.

Trie. Montru al ne-esperantistoj ke la Internacia Lingvo funkcias.